


HISPANA  
ESPERANTO-BIBLIOTEKO

HISTORIO - ARTO - LITERATURO - TRADICIO - BELAJ NATURAĴOJ - K. C.



FERDINANDO VI<sup>a</sup> kaj FARINELLI

HISTORIA NOVELO

PROZE KAJ VERSE ORIGINALE VERKITA

DE

JULIO MANGADA ROSENÖRN

---

PREZO: 0,70 Fr. sv.  
(DU RESPONDKUPONOJ)

---

ADRESO:

GLORIETA DE BILBAO, 5. — MADRID  
HISPANUJO

1471

Aĉeta la jenajn verkojn de la sama aŭtoro:

**HISPANA GRAMATIKO PRI ESPERANTO**, ĉi tiu lernolibro estas la plej simpla konciza kaj efika por hispanlingvanoj, kaj eĉ la plej malkara: 75 centimojn.

**HELPANTA TEMARO POR LERNIGI RAPIDE ESPERANTON** kiun oni povas uzi en ĉiuj landoj, ĉar ĝi estas verkita tute esperante, kaj kiu estas laŭ recenzintaj gazetoj («Heroldo de Esperanto», k. c.) unu el plej bonaj kaj kompletaj lernolibroj: 0,75 Fr. sv., por fremduloj; 75 centimojn por enlandanoj kaj amerikanoj. Mendante samtempe ambaŭ verkojn, enlandanoj havigos ilin al si po *unu* peseto kaj 10 centimoj; amerikanoj, po *unu* peseto 25 centimoj, kaj se oni mendus  *kvin* ekzemplerojn el ĉiu verko, po sama prezo kia por enlandanoj.

**AVILA**, kun historia kaj arta priskriboj, kun biografioj pri S. Terezo de Jesuo kaj la fama episkopo Alfonso de Madrigal kaj kun 30 belaj ilustritaĵoj sur luksa papero, kun 64 paĝoj: *unu* Fr. sv., por fremduloj; *unu* peseton, por enlandanoj kaj amerikanoj.

Tuj aperos **PRI HISPANUJO** kaj ĝiaj Popolkantoj. Popolkantaro de Murcia, kun muzikaĵoj. La Grupoj, Asocioj, k. c., devas riĉigi siajn Bibliotekojn aĉetante la plenan kolekton de la grava gazeto «Hispana Esperantisto» de la jaro 1917<sup>a</sup> al la 1922<sup>a</sup>, ambaŭ inkluzive, kun nombregaj ilustritaĵoj pri la rimarkindaj arkitekturaĵoj de Sevilla, Burgos, Segovia, k. c., kun tre interesa teksto sur luksa papero. La kolekto estas belega granda volumo: 20 Fr. sv. por fremduloj; 25 pesetojn por amerikanoj kaj enlandanoj.

**HIMNO DE HISPANA ESPERANTO - ASOCIO**, versaĵo de D-ro Zamenhof «Preĝo sub la verda standardo», muzikaĵo de J. Seva: 2 pesetojn.

16x0000mel00017144

*J. Martin*

HISPANA

ESPERANTO-BIBLIOTEKO

HISTORIO - ARTO - LITERATURO - TRADICIO - BELAJ NATURAĴOJ - K. C.



FERDINANDO VI<sup>a</sup> kaj FARINELLI

HITORIA NOVELO

PROZE KAJ VERSE ORIGINALE VERKITA

DE

JULIO MANGADA ROSENÖRN

---

---

**PREZO: 0,70 Fr. sv.**  
(DU RESPONDKUPONOJ)

---

---

ADRESO:

GLORIETA DE BILBAO, 5. — MADRID

HISPANUJO

## AL LA ESPERANTISTOJ!

Karaj gelegantoj, mi fondis ĉi tiun Bibliotekon ne celante monari profiton, mia celo estas utiligi esperanton por konigi Hispanujon de ĉiuj vidpunktoj al fremduloj kaj eĉ al samlandanoj, kaj por havigi al la Esperantistaro interesajn legolibrojn kiel eble plej malkarajn laŭ kosto pro presado kaj poŝtsendado. Antaŭ ol aperigi ĉi tiun kajeron mi celis eldoni alian pri popolkantoj sed la muzikajoj postulis prokraston. Se vi, karaj gesamideanoj, vin montrus aĉetantemaj, vi ĝuus tuj la libron pri popolkantoj, novelojn de Cervantes, tutmond fama aŭtoro de *Don Kihoto*, k. c.

Certe vi konscios per la prezo, per la prezentado kaj per la teksto de ĉi tiu verketo, ke mi ne erarigas vin; kaj mi esperas, ke vi vin montru tiel, kiel mi diras antaŭe.

Dezirante al vi ĉiajn feliĉojn kaj celante feliĉigi vin per sia Biblioteko, salutas vin kore kaj frate

LA AŬTORO KAJ FONDINTO

Hispanujo estis felica sub regado de la Reĝo **Ferdinando VI<sup>a</sup>**, kiun konstante benis kaj laŭdis liaj regatoj: tial precize, la konsterno de madridanoj estis grandega, kiam oni parolis pri lia morto. De antaŭ unu monato la reĝo ne estis elirinta el siaj ĉambroj, kaj nenium li estis akceptinta krom la kuracisto, Doktoro **Pérez**, per kiu nur oni sciis pri li. La popola instinkto, neniam erarante, antaŭsentis gravan intrigon kontraŭ la reĝo amata; oni diris, ke la ministroj, interkonsente kun la kuracisto, kaŝis la morton de la reĝo. Publika malkontento kreskadis pli kaj pli, kaj la popolo minacis ribeli subite. La politikaj partioj profitis la okazon por atingi siajn celojn: iuj estis favoraj je la reĝino, **Maria Bárbara**, edzino de la reĝo; aliaj, je la reĝido **Don Filipo**, frato de la reĝo, kaj inter liaj partianoj estis la tiam ankoraŭ potenca kaj kruela Inkvizicio. Ĉiuj esperis la baldaŭan morton de la reĝo kaj estis sin preparantaj por kapti la regnan regadon.

— Kiel fartas la reĝo? — demandis la markizo **de Fraga** al la kuracisto.

— Tial, ke vi estas unu el niaj partianoj, mi sciigas al vi, ke grandega melankolio kaptis la reĝon; ke de antaŭ unu monato ĉi tiu melankolio progresas rapide... Li ne forlasas sian ĉambron... Li volas vidi nenium... Ĉiam en sia kabineto, preskaŭ senluma, li rifuzas ŝanĝi siajn vestojn je aliaj puraj... Li ne permesas, ke oni lin razu... Li malfortigadas rimarkinde kaj rapide.

— Tamen, ankoraŭ li estas tre juna...

— Jes, li estas tridekkvinjara, sed pro lia edukado kaj korpomalforteco..., fine, je baldaŭa tago, li imitos sian patron, **Filipon Van**, kaj **Karolon I<sup>an</sup>**, forlasonte la regnan regadon kaj sin enfermonte en monaĥejo.

— Sed, ĉu li donos la regnan regadon al sia edzino?

— Ne, pro Dio!, al sia frato **Don Filipo**, granda princo, tre favora je la Sankta Inkvizicio. Ĉu portugala princino, freneza, mondema, amikino de l'Artoj, regonta Hispanujon? Neeble! Neniel!

— Kion ni faru, do, tial ke ni opinias same, kiel vi?

— Atendi la okazontajon laŭdante la princon kaj malbonfamigante kiel eble plej la reĝinon.

—Sed ŝi havas partianojn, ŝi estas juna kaj bela kaj oni diras, ke ni organizas ribeladon por atingi la ŝtatregadon.

—Kontraŭe, estas ŝiaj partianoj, kiuj intrigas kaj konspiras; ĉi tiun nokton mem oni surprizos kunvenon, kiun ĉeestos la reĝino kaj ĉefaj partianoj ŝiaj, laŭ ricevitaj informoj.

—Certe, tio estas kreitaĵo de via fantazio! Tial la popolo malamas vin!

## II

Belegan someran nokton, oni aŭdis la rebrudadon kaŭzatan de la maldrida popolamaso maltrankvila kaj preta ribeli. Viro, humile kaj malriĉe vestite, portante violonon kvazaŭ antikva vaganta kantanto, akompanis ŝajne graciace junulinon, kiun kaŝis densa vualo; ŝi, prenante lin ĉe la dekstra brako, ekiris rapide al la placo **Oriente**, kaj eĉ oni povis rimarki ŝian ekscitiĝon.

—Trankviliĝu, Sinjorino! —diris per dolĉa voĉo, kvazaŭ anĝela, la malriĉa muzikisto.

La nekonatino, sen respondo, akcelis la iradon kaj proksime je la palaco profunde sopiris kaj parolis:—Benata estu Dio! Ha, kiu ajn vi estas, neniam mi forgesos la grandan servon, kiun vi faris al mi min akompanante ĝis ĉi tie!—kaj ŝi, forlasante la brakon de la muzikisto, antaŭeniris en la enirejon de la palaco.

—Bonvolu, Sinjorino, diri al mi, kiun mi servis, ĉar ĉi tio estas granda feliĉo por mi je la tago mem de mia alveno al ĉi tiu ĉefurbo. Kvankam rapide tiel petis la muzikisto, samtempe antaŭenirante, la nekonatino ne respondis, kaj ŝi alvenis al gardostaranto ĉe la pordo, rapide iomete malkaŝis sian vizaĝon, mallaŭte ion alparolis kaj eniris, dum la soldato ŝin honoris per la pafilo. La muzikisto, priokupate kaj antaŭenirante, estis surprizata de subita ekkrio de la gardostaranto: —Malantaŭen!

Ĝus alveninte kun sia arto kiel sola riĉaĵo, kun sia klera talento kaj deziro trovi bonan sorton, elirante el modesta gastejo en nekonata strato, li sin trovis meze de viramaso forkuranta kaj persekutata de policanoj, kaj preskaŭ lin faliganta; subite, li sin sentis prenata ĉe la brako, de tremanta virino petanta je li akompanon ĝis la proksima reĝa palaco.

Nenio en ŝi vidigis al la junulo bazon aŭ suspekton por konjekti ion pri ŝi; nur restis al li ŝia ganto, kiu je la momento de la renkontiĝo falis kaj kiun li rapidege deprenis de sur la stratpavimo.

Li elpoŝigis la ganton, ĝin ekzamenis ĉe la lumo eliranta el subaj ĉambroj de la palaco, kaj rimarkis literojn M kaj B kaj ciferon orbroditajn; tiam li pensis pri ŝia altrangeco.

Li, grandanima kaj talenta, ekpensis, ke la ganto estos la bazo de lia riĉiĝo kaj feliĉo; kuraĝa, li decidis koni misteron de la aventuro. Sed nepre necese estis pasigi la nokton kaj iomete trankviligi almenaŭ la malsatan stomakon; kaj enpoŝiginte siajn manojn kaj trovinte nenion, li forlasis siajn ĥimerajn iluziojn, sed tute trankvile ekkriis:—Antaŭen, je Diablo! Tia estas la vivo de la artistoj... Hodiaŭ, eĉ sen monero...; morgaŭ, tiel riĉa, kiel ĉefepiskopo!

Je tiu momento mem, maljunulo kun blankpudrigita peruko eliris el la palaco, kaj unu el la lakeoj irantaj antaŭ li ekkriis:—Ĉi tien veturilo de la reĝa ĉefkuracisto!

Rapida penso decidigis la junulon alproksimiĝi al la kuracisto kaj alparoli tiel;—Mi petas, ke vi bonvolu aŭskulti min!

—Apartiĝu; pardonu, pro Dio, ĉar monon mi ne havas!—fiere diris la kuracisto.

—Mi ne estas almozulo, konsulton mi petas, kaj via granda populara talento...—rediris trankvile la junulo.

Pli trankvile jam, sed ĉagrenate, la Doktoro denove diris:—Kian doloron vi sentas? Rapide, ĉar min atendas.

—Ĉu malsanon? Ne Mi estas artisto, kantisto...

—Kantisto!... kun abomeno ekkriis **Pérez**.

—Jes, kiu konstatis sian talenton... Mi kuraĝas diri tion ĉi, kaj mi esperas, ke vi protektos min por ke oni akceptu min en la palaco.

—Ĉu en la palaco? Kia senhontaĵo!

—Moŝta Sinjoro, ne rifuzu vian helpon al mi; la medicino kaj la muziko devas helpi unu la alian... **Eskulapio** estas filo de la dia **Apolo**.

Sempacienca kaj kolera, la Doktoro kriis malestime:—For, aventurero, histriono!... Danku Dion, ke mi ne ordonas bastonfrapi vin...—kaj li supreniris en la veturilon.

La muzikisto, mokante sin mem pro sia malbonŝanco, diris al si mem:—Nenio favoras min ĉi tiun nokton... Ne estas rimedo por solvi la konflikton...—kaj meditante iom da tempo, li ekriis:—Jes, estas rimedo. Mi nekonata... Nokte... Ĉi tiu granda placo estas bona teatro: tiuj, kiuj promenas profitante la agrablan veteron, estos la publiko pagonta min se ĝi konsentos. La momento estas ĝustatempa.

Li ĵetis sian ĉapelon sur la pavimon kaj ekludis belegan preludon.

La promenantoj iom post iom alproksimiĝis kaj ĉirkaŭis la ludanton, altirate de la dolĉa melodio. Kiam li sin vidis ĉirkaŭata de multenombraj personoj, li kantis per rava voĉo:

Etendiĝas mia voĉo, vibras,  
ĝi estingas poste sian ardon,  
ĉar la mia koro tre moviĝas,  
kiam mi kantadas mian amon!

Sopiradas dum la tuta vivo  
la tre amantema najtingalo;  
de l'kolombo blanka lasta spiro  
jesas pri la nevenkebla amo!

Ĉiam li vagadas sur la tero  
tre malfeliĉega, la Kantanto!:  
lia tuta vivo estas temo  
de la liaj kantoj pri la amo!

Kiam morto min ankoraŭ junan  
ekforrabos, tiam la okazo  
ne min donu sorton tre teruran,  
ke mi povu kanti pri la amo!

Se por kanti mi ne havus povojn  
en la tiel malfeliĉa tago,  
alvenigu al mi ĉiujn notojn  
de la gajaj kantoj pri la amo!

Malriĉulo!, mi almozon petas,  
tuj de Dio venos al vi pago,  
ĉar mi kiel monon sole tenas  
miajn dolĉajn kantojn pri la amo!

La publiko entuziasme aplaŭdadis kaj pluvego da moneroj falis en ĉapelon de la muzikisto, kaj kiam, laŭ peto de la aŭskultantaro, li estis preta kanti denove, oficiro kun soldatoj alvenis al li kaj ordonis:  
— Je nomo de la reĝo, sekvu min!



Aŭdinte reĝan decidon, ĉiuj demetis siajn ĉapelojn kaj la kantanto parolis: — Vi eraras, ĉu mi arestata!?... Ĵus mi alvenis al la ĉefurbo...

Perforte la oficiro kondukis lin al la palaco. Ĉu konspiranto, ĉu spiono, la aŭskultintoj lin kvalifikis; sed ĉiuj opiniis, ke li estis bonega kantanto kaj violonludisto: li estis **Karoli Broschi**, vera genio, alveninte al Madrido malriĉa kaj kaŝante sian nomon per la pseŭdonimo senmorta «Farinelli».

### III

Sekvantan tagon, en la reĝa ĉambro, la markizo de **Fraga** demandis al Doktoro **Pérez**: — Kiel la reĝo fartas? Certe la nokto estis malbona, ĉu ne?

— Male. Neniam li sin sentis pli forta, kaj li havis kapricon, li devigis supreniri al sia ĉambro vagantan kantiston, kiu kantis ĉe la **Placo Oriente...**

— Oni diras, ke la reĝo, aŭskultante la kantiston, ploris.

— Je la ekkantado mem, li kortuŝiĝis kaj ekkriis: «Estas voĉo de anĝelo», kaj atente aŭskultadis; li ploris. falis genuen, kaj ekkriis ree ĵus kiam eksilentis la kantanto: «Alian fojon! Mi volas aŭdi tiujn notojn, kiuj rehavigas al mi la vivon.» Ree kantis la artisto. kaj, je la fino de la kanto, la reĝo eliris, brakpremis lin ekkriante plenĝoje: «Mia anĝelo, mia savanto, petu ĉion, kion vi volas, vi ĉion havos!»

— Estas mirinda la okazintaĵo! Ŝajnas, ke la reĝo freneziĝis!

— Ne; la voĉo de la muzikisto impresis lian nervaron.

— Certe la aventuremulo riĉiĝis trouzinte proponon de la reĝo.

— Tute male. Li petis je la reĝo, ke oni ŝanĝu tuj lian veston, kaj ke li permesu, ke oni lin razu; la reĝo tuj kompleksis la petinton. Kompreneble, la kantisto ne revenos al la palaco post sia eliro.

— La artisto, per sia influo, eble estus povonta kuraci la reĝon, kaj tiam niaj projektoj...

— Tiel povus okazi; sed ne okazos. Vidu! La senhontulo alproksimiĝas! Rapide li foriros ĉar mi lin elpelos!

La reĝo gastigis **Farinelli'n** en la palaco, ordonis provizi al li pli bonajn kaj decajn vestarojn kaj donis al li ankaŭ propramane skribitan ordonon por ke la reĝa administranto donu al li grandan monsumon ki rekompencu por lia kanto kaj pro lia sindonemo.

**Farinelli** alvenis de la strato en la reĝan palacon, liaj preskaŭ ĉifonajoj ŝanĝiĝis je elegantaj vestoj. Lia bela figuro gracia mirigis la korteganinojn, kaj kvankam li tion ĉi rimarkis, lia penso neniam deflankiĝis de la altrangulino de la ganto, kies gracia talio lin mirigis, kies voĉo alvenis al lia koro kiel amkanto, kaj kiu sendube estas bela. Li volis scii kiom da mono la reĝo al li donis per tiu pagordon kaj li miregis, ĉar li havis antaŭ siaj okuloj dokumenton per kiu la Inkvizicio kulpigas la reĝinon kaj petas sian elpelon el la kortego. Ne sciante klarigi al si tion, li turnis la folion kaj legis: «Pagu al majstro **Farinelli** sesdekmil realojn. Mi la Reĝo.» Lia pova imago komprenigis al li tion, kio okazis: la reĝo prenis la plej proksiman paperon, neatentinte pro entuziasmo, kaj skribis la pagordon dorse de la dokumento. **Farinelli** decidis konservi la pagordon por profiti la unuan okazon povi ĝin lasi sur la tablo de la reĝo; sed lia grandanimeco, lia sindonema koro, preta je ĉiama ofero por simulo, devigis lin pensi pri la reĝino, tiel bela, kiel juna kaj simpatia, kontraŭ kiu konspiris la reakciuloj: —Ha! Se mi iomete estus scionta pri la konspiro, mi ĝin frakus. Se mi konus la belan altrangulinon de la brodita ganto, ŝi min helpus savi la reĝinon, kaj ĉi tiu protektus mian amon, ĉar mi amas la virinon, kiun mi serĉas kaj ne konas. Mi ne scias ĉu ŝi estas nobela, ĉu riĉa; sed, spite de ĉio, mi kuragas levi miajn okulojn al ŝi, ĉar la genio estas la vera nobeleco, la sola riĉeco —paroletis tre mallaŭte al si mem **Farinelli**, nesciante ke li interesiĝis pri unu kaj la sama persono, kaj ke la nekonatino estis la reĝino mem. Silentinte kaj singardeme, li eniris en la reĝajn ĉambrojn kaj, renkontinte la Doktoron kaj la markizon, li salutis ilin gentile kaj senembarase. Ironie **Pérez** alparolis lin: —Amata artisto, lia reĝa Moŝto estas entuziasma je via arto...

—Lia reĝa Moŝto trograndigas pro sia granda boneco!—respondis **Farinelli** modeste.

—Li laŭdas vian belan voĉon kaj ludarton; li diris al mi, ke mi vin danku kaj adiaŭu...

**Farinelli**, kvazaŭ senintence ridetante, diris: —Tio ne estas ebla. La emocio de la reĝo, lia plibonfartiĝo pro mia kanto, lia favoro al mi, lia decido plenumi mian deziron, lia komplezo...

—Adiaŭ, amiko, diru ĉie, ke la reĝo vin honoris aŭskultinte vian kanton, kiu ravis lin—fiere, malestime eĉ moke, realparolis **Pérez**.

**Farinelli** perfekte komprenis malamikecon de la Doktoro nepardo-

nonta sian triumfon, kaj sin pretigis eliri, kiam tri manklakoj kaj ekkrio «la Reĝino» anoncis ŝian alvenon.

Kiam la kantisto ŝin vidis kaj ŝin rigardis kaj rigardadis atente, li pensis esti vidinta ŝin ie; ŝian gracion talion ie li vidis; iam kaj ie li rimarkis ŝian majestatan paŝadon, sed vane li volis memori.

—Kie estas la mirinda kantisto laŭdata de ĉiuj, kiu tiel efike influis la reĝan spiriton per sia kanto?—demandis la reĝino.

—Jen li—respondis ceremonie kaj flateme hipokrite la markizo montrante **Farinelli**'n.

—Sed ĉu ankoraŭ restas ĉi tie tiu intriganto?! — tre mallaŭte parolis la Doktoro sin turnante al la markizo.

—Alproksimiĝu, alproksimiĝu, majstro. Mi multe ŝatas la muzikon, mi estas tiel muzikema kiel la reĝo, mia tre amata edzo, kaj mi dankas vin, ĉar via kanto kvietigis liajn suferojn—diris la reĝino.

**Farinelli** falis genuen, kaj ekkisante la engantigitan manon de la reĝino, li rimarkis brodaĵon saman, kian havas la retenita ganto; li miris, paliĝis kaj momenton ŝanceliĝis preskaŭ ekfalante senkonscie ĉe la piedoj de la reĝino, kaj tremante balbutis mallaŭte:—Mia Dio! Tiuj cifero kaj literoj!

La reĝino, rimarkinte ĉion okazantan al **Farinelli**, demandis:—Kio okazas al vi?

La muzikisto, ne apartigante la rigardon el la engantigita mano respondis per voĉo apenaŭ aŭdebla:—Ha, mia reĝino!...

—Parolu!

**Farinelli** eltiretis la ganton el brustpoŝo kaj la reĝino ekkrietis: —Kion mi vidas?—kaj sin turnante al la akompanantoj, al la Doktoro kaj al la markizo, diris:—Mala!proksimiĝu.

**Pérez** miregis pro la reĝina konduto konfida je nekonata artisto, kies meriton li ne komprenis.

**Farinelli** mallaŭte diris:—Moŝta Sinjorino, hieraŭ vespere, en la paco, estis...

—Mi ne komprenas vin!—diris la reĝino kun granda emocio.

—Ha, mia reĝino! Tial ke malamikoj vin ĉirkaŭas, kaj ke vi ne konas min, vi ne estas fidema je mi; sed urĝas... Grava danĝero minacas vin. Estu certa je mia senkondiĉa fideleco al vi, plenrespekte kaj tutkorege mi estas preta je via dispono...

—La reĝoj ĉiam aŭdas samon, kaj tamen malmultaj estas fidindaj!

**Farinelli** rimarkis, ke la doktoro kaj la markizo spionis, penadis-

aŭdi ilin kaj tiam laŭte li demandis la reĝinon: Kion vi deziras, ke mi kantu, ĉu markanton aŭ alian kanton?

—Jes, markanton, tiun, kiun vi kantis al la reĝo...

**Farinelli** kantis, kaj sian voĉon li akompanis kun la sonoroj de la violono:

De la ondoj per la forto  
—Je subita fulmo hela—  
Jam vidiĝas al la morto  
Rapidiri barko vela!

*Jam ekregos direktilon  
Sperte mia mano;  
Vi rehavu la trankvilon  
Spite l'urogano!!!*

La artisto ludadis la violonon ravege, kaj la reĝino mallaŭte, singardeme kaj dube diris al li: Kion mi faru? Viaj paroloj estas tiel novaj kaj interesaj al mia koro... Majstro, se mi dezirus, kian pruvon pri via fideleco mi havus?

Mallaŭte la ludanto respondis:—Jen ĝi—kaj, laŭtigante la voĉon, aldonis dum li prezentis paperon al la reĝino, ĉar atenteme oni observadis ilin.—Vi povos sekvi la kanton legante dum mi kantas—kaj tuj, per impona majstreco kvazaŭ je dia inspiro, li rekantis:

Tre trankvila kaj kuraĝa  
La maristo, kaj tre sperte,  
Dum ventego eĉ sovaĝa,  
La havenon trafos certe!

*Jam ekregos direktilon  
Sperte mia mano;  
Vi rehavu la trankvilon  
Spite l'urogano!!!*

—Ho ve! Kiel vi posedas, ĉi, tiun skribaĵon?—demandis la reĝino.

—Ĝin donis al mi via edzo, ĉar certe li ne legis ĝin. Legu dorsoflanken.

—Ha, kian grandan pruvon vi donas al mi!

**Farinelli** daŭrigis sian violonludon dum la mallaŭta kaj mallonga konversacio, kaj pro alproksimiĝo de la scivolemaj doktoro kaj markizo denove diris:—Aŭskultu!—kaj per energia, kuraĝa kaj plej rava voĉo, daŭrigis la kanton:

Vi ne timu, do, la maron;  
De la furiozo ĝia  
Rompos certe tuj la baron  
La trankvila mano mia!

*Jam ekregos direktilon  
Sperte mia mano:  
Vi rehavu la trankvilon  
Spite l'uragano!!!*

—Neeble kanti pli bone; ravite de via voĉo kaj de via talento mi vin nomas ĉefprofesoro de mia kapelorkestro—entuziasme ekkriis la reĝino.

—Ĉefprofesoro de la reĝa orkestro! plenĝojege ekkriis Farinelli: sed tuj, ceremonie, plenspekte, li aldonis:—Sed mi ne meritas tion...

La doktoro interrompis hipokrite ceremonie, sed fieme, sin turnante al la reĝino:—Sed, kion diros la korteganoj?

—Ili diros kiel ĉiam—respondis ridetante malestime la reĝino.

En ĉi tiu momento mem terura rebruado alvenis de la strato. La popolamaso minacis furioze, ĉar ĝi estis avida vidi sian reĝon, sian amatan reĝon Nenio kaj neniu povis trankviligi ĝian koleron minacantan alveni, kvazaŭ uragano, al reĝaj ĉambroj. La korteganoj, tremante, nenion sciis fari por solvi la konflikton; la fiera kaj tirana doktoro tremegis, kiel tremegas ĉiuj tiranoj kiam la instinkto de la popolamaso decidas fari justecon per si mem; speciale kontraŭ li direktiĝis minacoj kaj malbenoj. La reĝino, fidema nur je **Farinelli**, turnis al ĉi tiu sian rigardon, petante solvon, fidema je sia jam fidela amiko, kiu restis trankvila eĉ ĝojanta.

—Lasu nin vidi la reĝon!... La reĝon!...—furiozege kriadis la popolamaso.

—Estas nepre necese, ke la reĝo eliru al la balkono por trankviligi popolamason—tremante balbutis la doktoro.

—Ĉu li volos eliri?—demandis la reĝino.

—Mi opinias, ke li ne eliros, ĉar de antaŭ unu monato neniu atingis elirigi lin el lia kabineto—hipocrite respondis la doktoro, tial ke li obstine celis kaj ĝis nun evitis lian eliron, interkonsente kun siaj partianoj.

—Mi petegos tion al li kvankam mi riskos lian koleron—rediris la reĝino alirante al la reĝa dormoĉambro. Tuj oni aŭdis frapojn sur la pordon, sed vane, la pordo ne malfermiĝis kaj la reĝino senespera reaperis.

—La Reĝon!... La Reĝon!... Ni mortigu la perfidulojn!... —furiozege ekkriadis la popolamaso, kreskante pli kaj pli.

—Kiu savos nin?—diris la reĝino, kortuŝate kaj turnante siajn belegajn okulojn de la kantisto ĉielen.

—Mi! Malfermu la balkonon kaj diru al la popolamaso, ke la reĝo eliros—arogante, energie kaj memkonfide, kriis **Farinelli**.

—Kion vi intencas, **Farinelli**?—diris la reĝino.

Vi vidos. Preĝu, ke la reĝo aŭdu min—kaj preparante la violonon li sin direktis en la pordon de la reĝa dormoĉambro, kaj kiel serĉante en sia fantazio ideon, li vibrigis la kordojn de sia instrumento laŭ korduŝanta ekelpensata melodio kaj kantis improvizante:

*Ĵetu for enuon  
Reĝo! Malfeliĉ'!...  
La Popolo ploras  
pro terura tim',  
ke vi baldaŭ mortos  
kaj forlasos ĝin!*

Kaj ĝi gaja estos  
nur vidante vin.  
De l'enuo via  
estu jam la fin'.  
Aŭdu mian kanton;  
nu, aŭskultu min;  
ke mi vin konvinku  
pere la muzik';  
ke la malgajeco  
ne plorigu vin;  
ke ĉe viaj lipoj  
jam aperu rid'

*Ĵetu for enuon  
Reĝol Malfeliĉ'!...  
La Popolo ploras  
pro terura tim',  
ke vi baldaŭ mortos  
kaj forlasos ĝin!*

**Farinelli** finis la improvizitajon, aŭskultis ĉe la pordo, kaj sin turnante al la reĝino, diris: — Nenio ankoraŭ.

Senespero elmontriĝis sur vizaĝoj ĉies, kaj **Farinelli** energie rediris esperigajn parolojn precipe por la reĝino kaj reludis, kaj rekantis:

*Ĵetu for enuon  
Reĝol Malfeliĉ'!...  
La Popolo ploras  
pro terura tim',  
ke vi baldaŭ mortos  
kaj forlasos ĝin!*

Ha se vi elirus  
komplezante min,  
kaj popolo vidos  
ridetanta vin:  
vi aplaŭdojn varmajn  
aŭdus jam sen lim'!  
Via sano estas  
sola la dezir'  
de popolo nobla,  
tiu de la Cid (1)  
kiu al vi montras  
tre fidema sin!

*Ĵetu for enuon  
Reĝol Malfeliĉ'!...  
La Popolo ploras,  
pro terura tim',  
ke vi baldaŭ mortos  
kaj forlasos ĝin!*

---

(1) Fama kavaliro hispana, heroo, tiel nomata de la maŭroj timantaj lin.

La pordo malfermiĝis; la reĝo eliris. **Farinelli** ludadis la violonon, kantadis ĉiufoje ju pli arte, des pli dolĉe kaj ravè, kaj malantaŭeniris kvazaŭ altirante, trenante la reĝon al la balkono, kaj la reĝo, allogate de la muziko kaj kanto, kun la vestaro tute senorda, kiel hipnotigato, alvenis al la balkono. La popolamaso lin vidis; entuziasme kaj unuvoĉe ekkriegis: —Vivu la reĝo!!! Vivu la reĝo amata!!!

Tiam **Ferdinando VI.**<sup>a</sup> rekonsciiĝis, rigardadis amatan popolamason, komprenis ĝian entuziasmon, kortuŝiĝis kaj metis sian dekstran manon sur la koron samtempe etendis la maldesktran brakon el la popolamaso, dirante per tia ĝesto sian profundan amon al ĝi. La publiko bone komprenis la geston kaj frenezigis je ĝojo, ebriiĝis je kontento kaj kriadis amon, kaj kriadante same disiĝis kaj invadis ĉiujn kvartalojn de la ĉefurbo. La reĝo kortuŝite forlasis la balkonon.

La reĝino ridetante diris al la kantisto: —Dankon! Vi estas talenta kaj grandanima.

—Ankoraŭ ne kvalifiku min tiel; unue mi devas venki viajn malamikaĵojn — diris **Farinelli** mallaŭte.

—Dankon, majstro. Vi savis min el grava konflikto —diris la doktoro.

—Jes, ĉi tiun nokton vi ne riskos la ŝtonojn, kiel antaŭajn: ĉiuj iris hejmen kontentaj kaj neniu atencos kontraŭ vi:—diris ridante moke **Farinelli**.

#### IV

Denove la melankolio kaptis la reĝon kaj nur la kantoj de **Farinelli** estis kapablaj redoni al li la preskaŭ estingiĝintan sentemon. Estis dolorige vidi lin: lia frunto sulkigita estis elmontranta velkintan junecon, li ridis kiel senkonsciulo, kiel idioto; li sidadis en brakseĝo, kaj nenium li akceptis. Nur rompis silenton de la reĝa ĉambro monotona brueto de funkcia horloĝo kaj la ritma paŝado de proksimaj gardstarantoj. En tiu soleco, eu konstanta korpa kaj anima enuo, lia vivo malrapide estingiĝadis same, kiel akvo de marĉo malaperadas vaporigate de la sunvarmo kaj sorbate [de la tero. Li sole akceptis **Farinelli**'n, kiu decidiĝis dediĉi sian arton al kuraco de la reĝo; ĉi tiun li ravis baldaŭ ne nur per sia arto, sed ankaŭ per siaj kvalitoj, ĉar la reĝo tuj konsciis, ke **Farinelli** estis sperta kaj klera viro posedanta diversajn lingvojn, parolanta ilin tiel korekte kiel la patran; ke la muzikisto havis fulman imagon, fruktodonan fantazion, riĉan kaj profundan juĝon kaj



firman konkludon pri kia ajn afero, kiun facile li projektis, disvolvigis kaj solvis, eĉ koncernantan la ŝtaton aŭ administracion. La reĝo konvinkigis pri la eksterordinara kapableco de **Farinelli** por efika ministro-posteno; tial baldaŭ la kantisto fariĝis amiko, savanto kaj konsilanto de la reĝo.

La reĝo resaniĝadis rimarkinde: li aŭskultis iujn, ekokupiĝis pri ŝtataferoj, sed en liaj decidoj oni vidis la influon de fremda volo, kaj korteganoj kaj ministroj celis fini la influon kondukantan la ŝtaton laŭ plano ne ŝatata de ili. Tial ili plej obstine intrigis profitante momentojn kiam la reĝo falis en malfortecon kaj celante apartigi **Farinelli'n** de li, kaj eviti tiel gereĝajn interpacigojn. Korteganoj, ministroj, pastroj, Inkvizicio, gemonahoj, reakciuloj kaj enviduloj konspiris kontraŭ la kantisto, kaj ili iom sukcesis, ĉar la reĝo refalis en la antaŭan grandan melankolion, sed tamen li vizitadis **Farinelli'n** tiom da fojoj, kiom li povis, ĉar lia ĉambro kaj tiu de **Farinelli** estis najbaraj, tial, ke li tiel ordonis, kiam li ne konsentis elpeli la kantiston el la palaco. La malamikoj de la reĝino eksukcesis!

**Farinelli** en sia ĉambro meditadis, kiel venki siajn kontraŭulojn kaj balbutadis: —Antaŭe mi havis konfidon je mi mem, mi esperis triumfi; hodiaŭ, malproksime de la reĝo, mi dubas. Ŝajnis, ke nenio kaj neniu estus povonta nuligi mian influon de tiam, kiam mia kanto savis la monarĥion. Oni apartigis min de la reĝo...; li, kvazaŭ forkuranto, venis viziti min iam, eble ankoraŭ venos, sed ankaŭ ĉi tio finiĝos, mi ne vidos lin plu, kaj fine oni devigos min forlasi la palacon... La Inkvizicio alarmiĝis pro mia influo, pro simpatio de la reĝo al mi, kaj oni timigis lian konsciencon. La monahoj sin montras fieraj, kaj ilia sintenado antaŭvidigas al mi baldaŭan malfeliĉon, kiun pro mi mem mi ne bedaŭros, ĉar mi ne estas ambiciema tial ke mia patrujo estas la tuta mondo kaj miaj voĉo kaj violono havigas al mi ĉion necesan por la vivo eĉ certe en la plej kaŝita anguleto de la terglobo; sed... kio okazos al la reĝino? Si oferota de friponaro! Ve, se mi ne estus koniata ŝin!... Mi ne devis forlasi mian naskiĝurbon, mi ne devis deziri koni aliajn landojn, mi ne devis migri celante plezurojn kaj famon, mi nur devis ŝati tiujn de la familio, tiujn de la noktpreĝoj ĉe la prapatra hejmo; mi devis esti altenata de tiu egoista sento pri patrujo, kies landlimojn neniam mi devis preteriri, ho, ve! **Bárbara, Bárbara**, ne kulpigu min ke mi kuraĝis levi miajn okulojn al vi kaj vin ami, ĉar, antaŭ ol mi vidis vin, miaj okuloj estis fermitaj al la amo, kiel tiuj de

blindulo al la lumo; sed mi ne maltrankviligos, anĝela reĝino!, vian vivon; neniam vi legos sur mia animo la ardon de mia koro; mia ardanta pasio estos al vi kvazaŭ fideleco de servanto, preta morti kaj sin oferi pro siaj mastroj; por ilia savo. De la nokto en kiu vi, potenca reĝino, vin apogis sur la brakon de tiu ĉi malriĉa nekonata kaj fremda kantisto, la sorto ligis mian destinton al via, mia vivo estas via; preta mi estas min oferi tute mute, neniam permesante al miaj lipoj elparoli eĉ solan amparolon!...

**Farinelli** rimarkis sukceson de siaj malamikoj, ĉar la vizitoj de la reĝo malplioftiĝis. Tial ke la reĝo komisiis al la muzikisto komponi operon, la intrigantoj profitis la aferon por konvinki la reĝon, ke li ne vizitu la komponanton, ĉar estis necese ne distri lin dum lia laŭdinda laboro. Tiel, perfide laŭdante **Farinelli**'n, la doktoro kaj gesampartianoj evitis la vizitojn de la reĝo al la muzikisto kaj influon de ĉi tiu.

La tuta tempo estis necesa al **Farinelli** por komponi la operon kaj esti vigla je la reĝino: la opero, laŭ kora antaŭsento de la geniulo, aŭguris al li sukceson kontraŭ liaj malamikoj. Li, pretekstante bezoni tutan tempon por la komponado, izoligiĝis; dume, la konspirantoj progresadis kaj la reĝino rifugiĝis en la monaĥinejon **Salesas**—de ŝi fondita—por peti je Dio resaniĝon de la amata ezdo.

## V

Septembran vesperon, je la sunkuŝiĝo, kiam la ombroj ekinvasas ĉion, kiam monaĥino ĵus estis batinta sonorilojn, kiuj alvokis monaĥinaron al la vesperpreĝoj, kaj neniu estis en la placo de la monaĥinejo, viro, plene kaŝite per mantelo, eniris en la sanktan hejmon. Jen li starante antaŭ la krado de la parolejo, li atendis la alvokitan ĉefmonaĥinon. Post malmulte da tempo, la abatino alvenis kaj demandis lin: Kion vi deziras je tiu ĉi horo, kiam neniun ni devas akcepti ĉe nia sankta hejmo?

—Mi deziras paroli al la reĝino.

—De kiam la reĝino estas inter ni, ŝi ne volis akcepti iun; ŝi preĝas, ĉar la morto de la reĝo estas proksima; ŝi agadas same kiel ni, tiel fervore kiel ni: ŝia animdoloro estas tre granda, sed pli granda estis la doloro de la patrino de Jesuo. La malfeliĉo, filo mia!, same alvenas al humila kabano, kiel al reĝaj palacoj!...—kaj tiel estus daŭrigonta la

abatino, se **Farinelli** ne estus interrompinta ŝin insistante vidí urĝe la reĝinon.

— Neeble, filo mia! Post la veperpreĝo neniun ni povas akcepti.

— La reĝino ne estas monaĥino, ŝi povas akcepti min kaj mi estas certa ke ŝi konsentos sciante, ke mi estas ĉi tie por ŝin vidi kaj paroli pri grava afero, kaj eĉ ŝi dankos Dion pro nia intervidiĝo, kaj ankaŭ dankos vin pro la granda servo, kiun vi faros al ŝi.

— Diru, do, vian nomon por ke mi diru ĝin al ŝi.

— Pardonu, mi devas silentigi mian nomon, ĉar, se mi ĝin parolus la servo riskus malsukceson eĉ gravajn danĝerojn por ĉiuj; donu al ŝi ĉi tiun ganton kaj diru al ŝi, ke la posedanto deziras paroli al ŝi tuj kaj sekrete.

La abatino scivolema alkuris al la reĝino por komuniki al ŝi la pretendon de la junulo. La novaĵo tuj flugis de monaĥino al monaĥino; ĉiuj religiulinoj sin sentis tiel scivolemaj, kiel la abatino, ne nur tial ke la krado ĉiam restis fermata je tiu horo kaj la malfermo supozigis gravan okazontaĵon, sed ankaŭ tial ke la monaĥino, kiu alvokis la abatinon, flustris al ore'oj de aliaj kamaradinoj parolojn pri la juneco, ĝentiteco, beleco, aroganteco, k. t. p., de la vizitanto, kaj ĉi tiuj paroloj vekis certe en la monaĥinoj rememorojn pri mondaĵoj, kaj multaj sin preparis vidi la junulon de angulo de koridoro ĉe la ombro, aŭ de oportunaj lokoj, eĉ iuj forĝesis sian nunan kondiĉon momente kaj ekintencis aranĝi siajn vestojn, kaj certe tuj ili sentis bedaŭron..., Dume, la junulo atendis senpacience la permeson; li estis maltrankvila, turmentata, ĉar li sciis, ke lia savo, kaj precipe tiu de la reĝino, dependos de la intervidiĝo. La kradpordon malfermis la abatino, kaj referminte ĝin, gvidis la junulon tra koridoroj en ĉambron. Jen li antaŭ<sup>o</sup> la pala kaj lacigita reĝino, kiu ekkriis rigardante la jus enirinton:—**Farinelli!**

Ĉi tiu alproksimiĝis respektplene, falis genuen kaj kisis la manon de la reĝino. La abatino sin pretigis forlasi la ĉambron malgraŭ sia scivolemo, sed la reĝino ŝin haltigis kaj diris, sin turnante al **Farinelli**: Parolu, ŝi estas mia amikino. Ankaŭ ŝi multe suferis kaj la suferintoj kaj la suferantoj ĉiam bone interkompreniĝas. Kiajn novajn danĝerojn anoncas al mi via vizito?

— La reĝo, pro intervidiĝo kun sia konfesprenanto, faris kvar decidojn...

— Mian ekzilon?

— Kaj mian; okazigi morgaŭ mem inkvizician feston, por elmontri la

povon de la kruela institucio kaj forveturi al **San Ildefonso**, kie la reĝo restados ĝis plena resaniĝo.

— Perfekte mi komprenas la celon de niaj malamikoj: doni la regadon al la princo **Don Filipo** dum la foresto de la reĝo, foresto profitota de niaj kontraŭuloj por atingi eksreĝiĝon de mia edzo.

— Tiel okazus se la reĝo forveturus, kaj tial via ekzilo estus eterna. Ho, mi konas niajn malamikojn, mi konas ilian intrigon, kies plenan sukceson ili esperas baldaŭ! Per fastado kaj korpturmentoj ili malfortigis la reĝon: per kalumnioj ili apartigis vin de li, kaj nun celas deprimi la kronon de sur lia kapo.

— Kion fari? Mi rezignos perdi la kronon, sed ne la amatan edzon; neniam mi konsentos, ke oni forrabu al mi la koron de mia edzo... **Ferdinando!** Mi amas lin, kaj min terurigas la estonteco preparita de ili por li!

— Malfeliĉulino — ekriis la ŝbatino, eksplorante.

— Danĝera estas la situacio kaj malfacile venki la intrigantojn. La Inkvizicio kaj la monaĥaro helpas la princon, ĉar tiel ili agas por si mem; la monaĥoj mastrumas la madridan populacion — diris **Farinelli**.

— Vi mem perdas la esperon... — angore diris la reĝino.

— Neniam! La tasko venki malamikojn tro interesis min, mi ne perdas kuragiĝon, ne pro mi mem, pro vi kaj por vi mi penados, por kaj pro vi sole, ĉe hipokrituloj kaj perfiduloj, ĉe reakciuloj. Mi ne timas la Inkvizicion kvankam bone mi komprenas, ke ĝi neniam estos pardononta min, same kiel ĝi ne pardonos viajn toleremon kaj entuziasmon por la artoj; mi ne timas ĝin kvankam ĝiaj procedoj estas rapidaj, teruraj, kruelaj — energie diris la kantisto.

— Ĉu Dio ne inspiros al vi ian savon? — kvazaŭ ĝemis la ŝbatino.

— Nur repaciĝo inter vi kaj via edzo estos efika por ŝarĝi tutplene la situacion.

— De unu monato mi celas tion sen sukceso, ĉar eĉ mi nemian povis paroli al li.

— Nu! Ĉi tiu humila kantisto havos la honoron savi la reĝon de Hispanujo!... Estu fidema je mi!

— Kion vi volas esprimi?

— Prenu kaj legu — kaj **Farinelli** donis al la reĝino skribaĵon, kaj la reĝino legis kun granda emocio: «Morgaŭ, je la dekunua mi iros al via ĉambro, atentu, ke neniu povu nin surprizi. Ĝis hodiaŭ mi ne povis trovi rimedon vidi vin.»

— Jes, estas skribaĵo de lia propra mano, la reĝo vizitos vin, sed kiel?...

— Mi ne scias la manieron, sed aliokaze li min vizitis kaj neniu sciis pri la vizito kvankam li estis kun mi dum unu horo kaj li min devigis kanti tion, kion li plej ŝatas. La morgaŭa okazo estos decida... Vi devos troviĝi en mia ĉambro antaŭ lia alveno.

— **Farinelli!** Kion dirus li? Kion dirus tiuj, kiuj tiom kalumniis min?

— Estas nepre necesa via frua alveno al nia rendevuo! — energie respondis **Farinelli**.

— Sed, kion vi diros al la reĝo? — angore demandis la reĝino, ruĝigante.

— Mi ne scias, sed via ĉeesto estas nepre necesa antaŭ lia alveno al mia ĉambro; estas necese, ke neniu sciu vian eliron, ke ĉiuj kredu vin senespera en ĉi tiu rifuĝejo. La abatino helpu nin; la monaĥinaro preĝu.

— Tiel ni faros. Mi vin benas kaj mi estas certa je la helpo de Dio! — diris la abatino. La reĝino kaj la kantisto falis genuen kaj la abatino, kvazaŭ kaptite de Dia inspiro, daŭrigis: — La Patro inspiru al vi la virton, kiu estas la forto subtenanta la homon dum malfeliĉo; la Filo faru vin konstanta por triumfi kaj, se necese, rezignacia en la malsukceso; la Sankta Spirito lumigu vian intelekton! Ne forlasu la reĝinon; estu pretaj viaj koro kaj brakoj ŝin defendi dum danĝeraj horoj. Se la konspirantoj triumfus, se ili disŝirus la reĝan mantelon kaj ĝiajn pecojn fortrenus sur la koton, se ili deprenus la perlojn kaj ornamentojn de ŝia krono, neniam vi ŝin forlasu, kaj se vi ne pereus dum la batalo, akompanu ŝin al la ekzilo kaj dediĉu vian vivon al la eksreĝino!

**Farinelli** starigis kortuŝite, kisis la manon de la reĝino restanta genue ankoraŭ en preĝo, kaj apenaŭ balbutis: — Ĝis morgaŭ, mia reĝino, antaŭ la deklunua! Mi min sentas kapabla venki! Havu esperon!

Denove **Farinelli** trairis la koridorojn, gvidate de la abatino sub rigardoj de monaĥinoj kaŝitaj ĉe la ombro. Baldaŭ li enspiris la freŝan venteton de la montaro **Guadarrama**.

## VI

**Farinelli** meditadis en sia ĉambro, kiam servisto anoncis al li viziton de la doktoro, kiu, spite de ordono de la kantisto pri neakcepto insistis obstine lin vidi, eble por konstati ĉu la juna artisto estis suspektanta ion.

—Bonan vesperon, mia amata **Farinelli!** Multe mi bedaŭras vian malbonsorton—ironie diris la doktoro.

—Doktoro, sufiĉe bone mi scias, kiel vi agis, kiel vi laboradis por mia sorto—malestime alparolis **Farinelli.**

—Ĉiam sprita kaj ironia!

—Tiel okazas, vi estas prava. Neniam mi estis pli kontenta ol nun kiam vi malsukcesas pri mia bonsorto, por kiu vi penadas ankoraŭ, ĉu ne? KREDU min, rimarku mian kontenton, kvankam mi ne vizitas la reĝin ĉambron, kvankam oni ne vidas min en la reĝaj salonoj.

—Ni bedaŭras vian foreston, ĉar vi jam estis preskaŭ tute necesa al ni.

—Ĉu vi bedaŭras? Ĉu necesa mia ĉeesto al vi?! Mi ne kredas—diris ridegante moke **Farinelli.**

—KREDU: mi venis por montri al vi mian estimon.

—Nu, donu ĝin; montru ĝin!

—Certe vi jam scias, ke nia amata reĝo, por elmontri sian amon al la Religio, decidis okazigi inkvizician feston. Estos tre agrabla la ceremoniaro, kaj por ke la reĝo kontentigu, mi pensis, ke vi samtempe aŭdigos al ni belan muzikon kaj vian ravantan voĉon.

—Kiel? Ĉu vi pretendas bruligi h-rezulojn akompanante iliajn angorajn kriojn kun mia kanto? Ho, ve! Kruela!...

—Ne. Malfeliĉe neniu ni brutigos; nur oni vergos iujn rapide aŭ malrapide laŭ takto de via muziko...—kaj la doktoro estis batanta ritme tablon.

—Granda, genia ideo!... Vergobatojn muzike!... Via penso estas vera novaĵo!—kaj **Farinelli** ŝajnis grandan kontenton.

—Vere, ĉu ne? Sed ni bezonas belan voĉon por la kantsoloj...

—Kantsolo pri la vipobato! Admirinde. aŭskultinde!

—Kaj, ĉar la reĝo altestimas vian talenton, mi pensis, ke vi certe estos akceptonta la postenon, ke vi ĝuos...

**Farinelli** ruĝigis pro indigno kaj kolere ekkriis: —!Doktoro! Doktoro!...

—Trankviliĝu Por vi oni pretigus belan tribunon kaj ĝin tapetigos per nigra veluro. Oni pagos vin malavare,

La kolero de **Farinelli** eksplodis subite, kaj, preskaŭ sin jetante minace al la doktoro, **Farinelli** kriegis: —Ĉu vi supozas min kapabla, preta, ludi tian rolon, tian abomenindan rolon el via kruelega, nehoma-ma farso? Ho, ve! Kanti viajn krimajn psalmarojn! Mi preferas mutiĝi

antaŭ ol fari tion! For de ĉi tie, ne insultu la artiston, kiun vi ne komprenas, ĉar vi ne estas inda je tiu kompreno! For, for rapide, krimulo!

La doktoro, terurigate reenpaŝis prudente iom post iom en la pordon, kaj atinginte ĝin, diris: —Mi foriras... Adiaŭ histriono! Mi miras pro via senhonto; vi ekscitas min al batalo...

—La diablo forportu vin!

—Mi revenos... kaj pli frue, ol vi povas imagi, sed por enkarcerigi vin, por tamburigi vian felon... Konspiranto, ribelanto - kaj la doktoro eliris certa fari la dirojn, je la sekvanta tago, avida je venĝo.

**Farinelli** posedis grandan trankvilecon por la plej danĝeraj momentoj kaj pripensante momente kaj releginte la skribaĵojn, kiun sendis al li la reĝo, ekkriis:—Mi ne eraras... la skribaĵo estas de la reĝo mem. La rendezuo elmontras, ke li ne forgesis min. Ha, perfiduloj!... Vi ludis dum mia foresto..., sed la ludo estas senvalora. Ree ni ludos!—kaj plentrankvile li pretigis sin ripozi, neatentante ke la sekvantan tagon lia libereco eĉ lia vivo kaj la destino de la amata reĝino estos minacataj de liaj malamikoj.

## VII

Du virinoj envolvitaj en densaj vualoj ĵus eniris en la ĉambron de **Farinelli**: la reĝino estis unu el ili; la alia, ŝia servistino. La monaĥinaro ignoris la eliron de la reĝino; la korteganoj, ŝian eniron en la palacon. La reĝinon kaj la servistinon eniris **Farinelli** en najbaran ĉambron je tiu, en kiu li estis komponinta la operon, en kiu estis preparita tablo kun bongustaj manĝaĵoj kaj vinoj, tablo kaŝita per ekrano. Malmulte da tempo poste, iu frapis singardeme la pordon; **Farinelli** malfermis ĝin kaj la reĝo eniris, kaj sin apogante sur brakon de la kantisto iris sidiĝi en seĝegon.

—Bonan tagon, kara amiko—diris la reĝo.

—Via reĝa Moŝto!—riverence alparolis **Farinelli**, kisante santempe la reĝan dekstran manon.

—Ĉi tie, ĉe via flanko, mi min sentas feliĉa; aŭdante vin, mi forgesas ĉiujn miajn dolorojn... ŝajnas al mi, ke mi estas same kiel vi, simpla kaj gaja artisto..., libera, sendependa! Nun mia feliĉo estas grandega!

—Facile estas, via reĝa Moŝto, ke vi ĝuadu feliĉecon tian, kian vi nun sentas, ĉar ĝi dependas de via volo mem, de via firma decido.

Ha, malfeliĉa, naiva **Farinelli**! Cu vi scias, ke oni perforte devigis min ordoni vian ekzilon?

**Farinelli** ŝajnigis surprizon kaj mallaŭte daŭrigis la reĝo: — La ministroj kaj mia konfesrenanto postulis de mi tion.

— Tiel, do, via reĝa Moŝto, vi elpelas min for de via flanko!?

— Ĉu mi vin elpelas!? Vin, mian fidelan amikon, al kiu mi ŝuldas la solajn trankvilajn momentojn; kiujn mi ĝuis de antaŭ multe da tempo!!! Ne, ne. Ili povas min apartigi de vi, sed mia protekto ĉiam akompanos vin kaj santempe, tre emociite, la reĝo celis preni la dekstran manon de **Farinelli**, sed ĉi tiu prenis tiujn de la reĝo, premis kaj kisadis ilin dum larmoj ŝprucadis el liaj okuloj.

— Trankviligu, **Farinelli**, trankviligu!... — Malmulte da tempo mi povas jam pasigi apud vi, sed mi volis vin vidi lastafoje antaŭ via foriro.

La kantisto serĉis inter siaj muzikaĵoj kaj demandis: — Kion, via reĝa Moŝto volas, ke mi kantu?

— Ion dolĉan, melankolian. Mi kredas, ke tio iomete trankviligos kaj ĝojigos min—la reĝo respondis per voĉo apenaŭ aŭdebla kaj plena je animdoloro, kiu paligis lin terure kaj subite; tial, la kantisto saltis al la reĝo kaj emocie demandis:

— Ĉu via malsano regraviĝas, via reĝa Moŝto?

— Jes, mi estas tre malforta... La konstanta dieto... la fastado...

— Fasti, fastadi konstante! Tio ne povas esti, nek devas esti, kaj se vi, via reĝa Moŝto, povus aŭdi tion, kion oni diras!...

— Kion?!

— Oni bedaŭras vian solecon, kiun oni atribuas al intrigantoj ĉirkaŭantaj vin; oni rememoras vian ekregadon, kiu prosperigis la nacion, vian eniron en Madrilon. La popolo entuziasme rememoras vian rajdanta ĝentile, gracie, sen fiero, kaj ke vi esperigis feliĉon por Hispanujo. Ha! La fanatika partio triumfis kaj malsukcesigis ĝiajn esperojn, ho, ve!

— Ĉu vi kredas, ke mi nescias la staton al kiu oni enkondukis min? Ne. Tial ke mi ĝin konas, jen la kaŭzo de mia melankolio mortiganta min kaj kiun nur vi scias malaperigi.

La reĝo starigis kaj sin montris pli kontenta:— Rimarku, estas momentoj dum kiuj mi reakiras miajn fortojn, dum kiuj vekigas miaj energioj, kaj tiam mi forkuras el la lumo kaj mi ploras pro doloro morala kaj furiozeco... Tiam mi volas elpeli ĉiujn for de mia flanko..., regi sola..., esti reĝo!

— Jes, jes! Vi estas prava! Tiel vi devas, agi, ja, regi sola, esti reĝo!



—Sed mi ne havas energiojn por tiu entrepreno... Preni sur min tian gravegan taskon timigas min, tremigas min kruele...

—Intencu tion fari, via reĝa Moŝto; faru tion!

—Ne, estas jam malfrue, tro malfrue...

—Neniam estas malfrue! For la influo sklaviganta vin! Forlasu tian vivon en plena izoleco! La krono postulas oferojn kaj la popolo esperas kaj meritas esti bone regata.

—Ne daŭrigu!

—Sed, via reĝa Moŝto, kio okazos al la popolo? Kio al la reĝino?

—Kio al la reĝino? Ŝi pli celas anstataŭi min por regi la regnon, ol mian re-anigon!—diris la reĝo tre malĝoje.

**Farinelli** plenrespekte, sed energie, rediris:—Mensogas tiuj, kiuj tion diris al vi, via reĝa Moŝto!

—Kion vi diras? Ĉu vi kuraĝas?...—ekkriis la reĝo kun granda miro.

—Via reĝa Moŝto, mi estas humila artisto, sed nobla, sincera, kaj kvankam mia kruda sincereco estos danĝera al mi ĝis perdigo de la vivo, mi diros al vi la veron... Jes, via reĝa Moŝto, la veron... Oni trompis vin kalumniinte la reĝinon, kaj se vi volas aŭ-kulti ŝin...

—Neniam, kaj ne parolu plu tiel, ĉar alimaniere mi kredos tion, kion oni diris al mi pri vi...

—Kion oni povis diri al via reĝa Moŝto? Nur, ke mi amas la reĝinon same, kiel mi vin amas; ke mi volas vidi vian repaciĝon kun via virtema edzino, kiu ambicias flegi kaj zorgi vin..., Jes... jes... mi tre laŭte diris, diras kaj diros samon kaj mi min sentas fiera tiel dirante, okazu al mi io ajn.

—Sufiĉas! Sufiĉas tiom da malrespekto—ekkriis kolere la reĝo frapante la ekranon. Ĉi tiu falis kaj tiam la reĝo vidis la tablon kun la manĝaĵoj:—Kio estas tio? Ĉu estas tio via matenmanĝo?—demandis la reĝo mirigate.

—Pardonu min, mi forgesis ordoni, ke oni elportu ĉion...

La reĝo alproksimiĝis, inspektis la manĝaĵojn kaj diris:—Mangindaĵ estas... Vi vin regalas bone!

—Dank' al via malavareco, via reĝa Moŝto!

La reĝo malkovris teleron kaj ekkriis plenĝoje:—Jen dolĉa ŝinko! La manĝaĵo plej ŝatata de mi.

**Farinelli** malkovris alian teleron kaj diris:—Makaronioj laŭ kutimo de Napolo. Bongustegaĵ! Se mi kuraĝus, mi petus je vi...

—Kion!?

—Ke vi gustumu la italan mangajon.

—Ĉu vi forgesas, ke mi fastas? Mi nenion devas manĝi ĝis la tagmezo.

--Sed jam estas horo.

—Doktoro Pérez reguligis mian nutradon..., rigoran dieton...

—Pardonu min, la doktoro estas azeno... Vi ĉeestos longan ceremoniaron, kiu postulas, ke vi akiru fortojn.

La reĝo ridetis kaj plej kontenta diris:—Je Dio, vi estas prava! La doktoro, kiam mi diras al li, ke mi min sentas malforta, tre laca, nur scias ripeti al mi: «Via reĝa Moŝto, estu paciencema.» Preskaŭ mi estas preta, mi min ekdecidas...

—Mangŭ, mangŭ iomete da makaronioj, via reĝa Moŝto!

...Bongustegaj! Mi iomete mangas por koni vian kuirmanieron—kaj la reĝo, rimarkante **Farinelli'n** preta verŝi vinon por li, aldonis:—vinon ne, mi nur povas trinki akvon.

—Neniel! Akvo estas vulgara trinkaĵo, ĉi tiun vinon.

—Sed la hispana vino estas tro forta... kaj mia kapo male...

—Ĝi ne estas hispana, sed malforta itala vino el la apudaĵoj de **Napolo**, kaj **Farinelli** donis pokalon da vino al la reĝo, kiu malrapide gustumadis ĝin plazure.

—Trinkinda! Ĝi kuragiĝas min!—kaj la reĝo donis la pokalon al la kantisto, kiu denove redonis ĝin plena je vino al la reĝo. La reĝo regustumadis la vinon kaj ekkriis:—Tio, kio okazas al mi, estas miriganta kaj mirinda. Antaŭ malmulte da tempo mi estis malĝaja kaj malforta, kaj nun... Ha, ĉi tio estas kvazaŭ ensorĉo! Ĉu ion vi kantas?

—Jes, laŭ via plaĉo. Ĉu vi volas aŭdi printempan kanton de amanto revanta pri la mastrino de lia koro, je la sunkuŝiĝo?

—Kantu, kantu do; mi min sentas alia!

**Farinelli** iomete preludigis kaj kantis per rava voĉo:

Sidas mi en la ĝardeno,  
suno finas subeniri,  
Birdoj ŝajnas jam sopiri  
pro proksima ombralveno.

Sin elmontras la Naturo  
bela kaj eĉ fruktodona!...  
Sonorilo tre belsona  
preĝalvokas de la turo.

Papilioj plenkaprice  
flugas planto en alian  
elmontrante amon sian  
frenzegon senmalice.

Rapidflugas la abeloj,  
multaj florojn ja gustumas,  
dum aliaj ĝoje zumas  
promesante pri mieloj.

De la simpatia grilo,  
ĝi ne pro kantado penas,  
akrasone al mi venas  
la tre monotona trilo.

Kaj de super la lekantoj,  
min pri amo diras jese  
najtingalo, kaj senĉese  
per la siaj belaj kantoj.

De kamparo tre proksima  
kie la koturno nestas  
ĝia kanto apudestas,  
forta kanto kaj sentima;

Kaj de l' valo, de la fundo,  
dum rivero ĝia fluas  
kaj samtempe ankaŭ bruas,  
la bojado de la hundo.

Movas la dolĉeta vento  
de la floroj la petalojn,  
kaj belegajn la konvalojn,  
kiujn ŝatas mia sento.

La venteto tra folioj  
kiel murmuradon faras;  
plenavide mi jam flaras  
la parfumon de lilioj.

Estas la sentiga horo!  
Kiam mi pri amo revas,  
kaj la puran senton levas  
al ŝi tre fidela koro!!!

La kantisto finis kaj la reĝo, saltante plena je entuziasmo ekkriis:  
—Ravanta kanto! La senco de viaj kantoj estas inda je via voĉo kaj majstreco! Kantu, kantu plu, ĉar mi sentas, ke mi resaniĝas.

**Farinelli** profitis la entuziasmon de la reĝo kaj redemandis: —Kion vi deziras, ke mi kantu?

—Gajan kanton, kuraĝigan, spritan, novan kanton!...—respondis la reĝo.

—Scenon el mia opero, do.

—Ĉu scenon el opero? Kion diros mia konfesprenanto?

—Li diros tion, kion li volos diri. Nur la fanatikaj pastroj konsideras la teatron diablajo... Mi pruvos al vi la malon, ke la teatro estas fokuso de progreso, estas civilizanta arto, kaj la artistoj per sia merito povas alveni al plej alta rango...

—Tre bone kaj prave! Ne ĉagreniĝu. Mi aŭskultos la scenon. Kiam temon vi elektis por la opero?

—**Almiliton de Granada.**

—Bonege! Brave! Nacian temon! Kiu estas la argumento?

—**Boabdil**, la maŭra reĝo ekzilis **Zulima'n**, sian amatan edzinon... kaj momente freneza pro ĵaluzo, li kondamnas ŝin esti mortigota, Fide-la sklavo enirigas **Zulima'n** apud **Boabdil** je la momento, kiam la maŭra reĝo sin pretigas subskribi la verdikton. **Boabdil** rigardas ŝin furioze... **Zulima** alproksimiĝas al li kaj per malgaja kaj peteganta voĉo diras al li:

Min aŭskultu, kara mastro!  
For de vi, ve, **Boabdil'**,  
ne **Zulima'n** vian ĵetu;  
mastro, ne ekzilu min!  
Ĉu okaze povis iam  
tre neinda la perfid',  
per mensogoj, kalumnioj,  
kun tre granda la subtil'  
naski en la vian koron

la suspekton pri la krim',  
kiun oni atribuis  
al viega la sklavin';  
kiel en aëro fumo,  
tute same, kalumni'  
ankaŭ mortos, malaperos!  
Rememoru vi, ke cin  
mi ekanis de l'momento  
de la nia renkontiĝ';  
ke kateno nevidebla  
tiam ligis ĝis sentin'  
ambaŭ niajn la destinojn:  
kaj ke via la anim'  
estas tute por la mia  
same kiel la radik'  
de la forta granda arbo,  
— min komatu, **Boabdil'** —;  
kiel akvo de rivero,  
per jam troa la rapid',  
fluas, fluas al la maro.  
kies ondoj plene ĝin  
akceptadas same, kiel  
iam kore kaj sen lim'  
viaj karesemaj brakoj  
akceptadis ĝoje min!  
Min aŭskultu, kara mastro,  
kaj ke mia la sopir'  
trafu vian kompatemon!  
Renask ĝu, do, la fid'  
en la via bona koro,  
aŭ, almenaŭ, la estim'  
Ke ne mortu pro doloro  
via ĉiam amantin'!

**Farinelli** rimarkis iom post iom la impreson de sia kanto kaj konstante ludante alproksimiĝis al la ĉambro en kiu estis la reĝino kaj per kompreniga gesto diris al ŝi, ke ŝi eliru. Dume, la reĝo, enprofundigite en pensado kaj aŭskultante la ravan muzikon, demandis emocie;

—Kaj kion diris **Boabdil**?

—Ankoraŭ nenion, li estas profunde emociita kaj la reĝino, rimarkante tion, daŭrigas.

Ĉe l' profundo de la koro  
sentas mi la amon mian  
nobla, neperfida al vi estas:  
ĝi la konstantecon sian  
ĝoje montras; vivas kaj sin nutras  
en momentoj ĉiuj, ĉiam  
ĉu pensante pri vi, kaj eĉ ĉie,  
aŭ memorante; kaj ĉian  
memoferon por vi preta fari;  
.....  
.....  
ĝi ne petas pli alian  
rekompencan, ho ve!, ol konsenton,  
ol permeson, **nur la vian**,  
por havigi al vi la kontenton!!!

Dum la kantanto tiel kantis, la reĝino eliris, sed la reĝo ne rimarkis ŝian ĉeeston ankoraŭ. Ŝi alproksimiĝis al sia edzo, kaj **Farinelli**, inspirite pli kaj pli, kantis per voĉo ju pli dolĉa, des pli kortuŝanta:

Tagon povis kalumnio malavara  
ja makuli mian vivon; sed mi juras,  
ke la amo mia por vi, edzo kara,  
ĉiam estis granda, kaj je kulpo, pura!..

En tiu ĉi momento mem la reĝo kovris siajn okulojn per siaj manoj, eble li pensis pri simileco inter sia situacio kaj tiu de la malfeliĉa **Boabdil**. Li lasis fali siajn manojn kaj vidis la reĝinon, kiu, surgenuie antaŭ li, prenis ameme liajn manojn. La reĝo, mirigate, stariĝis kaj ekkriis: —Mia edzino!...

—**Ferdinando!** Mia edzo kara! — la reĝino diris kortuŝite kaj ŝiaj okuloj petegis... La reĝo fiksitis sian rigardon en ŝiajn pupilojn kaj malfermante la brakojn prenis ŝin al sia brusto ekkriante. —**Marnjo! Marnjo amata!** —kaj sin turnante al **Farinelli** aldiris. — Ha, mia bona amiko! Dankon! Dankon!

— Mi triumfis! — balbutis al si mem la kantisto ebria je gojo.

Fortaj kaj ripetataj batoj sur la pordo laŭtiĝis surprizante la geregojn. Pli forte oni reŝapis la pordon kaj terura voĉo aŭdiĝis; — «Je la nomo de la reĝo, malfermu!».

— Kion signifas ĉi tio? — mire demandis la reĝo.

— Estas nepre necese obei — trankvile diris **Farinelli**.

— Malfermu, je la nomo de la reĝo; se ne, ni taligus la pordon! — furioze iu rediris de ekstere.

Malfermu, **Farinelli**; mi deziras vidi per miaj okuloj mem la aĵojn okazantajn ĉi tie: Venu **Marnjo** — kaj la reĝo tiris sian edzinon en la ĉambron el kiu ŝi eliris.

**Farinelli** malfermis la pordon kaj eniris la doktoro, oficiro kaj soldatoj, poliestro kaj servistoj. La poliestro diris emfaze: — Mi malliberigas vin de tiu ĉi momento, je la nomo de la reĝo!

— Vi min terurigas per tiom da singardemo! Ĉu mi riskigas la monarĥion? — moke diris **Farinelli**.

— Mi jam avertis vin hieraŭ vespere pri tio ĉi, kio okazas, **Malfeliĉa Farinelli!** — kvazaŭ kompateme, sed ŝerce diris la doktoro.

— Kion vi diris al mi?

— Ke mi revenos aresti vin; ĉu vi tiel baldaŭ forĝesis la hieraŭan scenon?

— Mi ne kamprenas vin.

— Facile vi tuj komprenos: dum nia interparolado hieraŭa, dum la sceno forĝesita de vi disvolviĝadis, la reĝo subskribis iujn dekretojn pri aresto kaj ekzilo.

— Ĉu la reĝo?... Ĉu tio okazis?

— Ankoraŭ li subskribos aliajn... **Malfeliĉa reĝo!**

— Se la reĝo aŭdus vin, doktoro!...

— Ne estas danĝero... La reĝo estas malsana, tre malsana kaj dum sia foresto li forlasos la regnan regadon ĝis resaniĝo, kaj li fatale ne...

— Sufiĉas! Submetigu! — ree kriis la poliestro.

— Oni kulpigas vin pro konspiro riskiganta la Ŝtaton. Ĉu vi tremas? — moke diris la doktoro, eĉ insultante demandis laste.

— Tremi! Tremi estas nur propaĵo de kanajlo, kiu vi estas; indigno estas tio, kio ruĝigas min pro ofendo via je mi. Ha, se mi povus alvenigi mian voĉon, miajn parolojn al la reĝo, mi dirus: — «Via reĝa Moŝto!, subskribu dekretan liberigantan Hispanujon: malpermesu fanatikecon, kaj inkviziciajn festojn malaperigu por ĉiam: donu al la popolo moderan

liberecon: progresigu la artojn kaj sciencojn; klerigu kaj saĝigu viajn regatojn. Tio ĉi estas la sola deziro de Hispanujo.»

—Vi estas ŝercema, viaj projektoj estas admirindaj; sed feliĉe vi estas la reĝa histriano kaj ne lia ministro—diris la doktoro.

—Vi eraras, doktoro! diris la reĝo, aperante subite.

La doktoro statuigis kiel marmoro: la poliestro, la oficiro, la soldatoj kaj la servistoj riverencis plenrespekte kaj en tiu sintenado atendis ordonojn de la reĝo. Ĉi tiu, per neatendita energio, daŭrigis:—**Farinelli**, vi estas fidela je mi, vi faris por la feliĉo de viaj gereĝoj kaj por la bono de la Ŝtato pli dum unu tago, ol mi dum ses jaroj. De hodiaŭ mi denove estas reĝo; de hodiaŭ mi sola regos la Ŝtaton kun helpo de la reĝino, kiu pardonas min; vi **Karolo Broschi**, ankaŭ helpas nin per via talento kaj lojaleco, de tiu momento vi estas mia ministro. Mia fidinda ministro, aŭskultu bone doktoro, mia amata kaj fidinda ministro!

—Via reĝa Moŝto! Kontentigas min nur esti direktoro de la reĝa teatro, plej gajiga posteno—modeste petegis **Farinelli**.

—Estu laŭ via deziro. For la terura ceremonio inkvizicia, niam plu ĝi okazos; mi instruos la popolon por ke fanatikeco malaperu dum mia regado kaj miaj posteuloj ne konu tian peston: mi protektos kaj defendos la religion en miaj landoj per edukado al virtemo; mi florigos la artojn kaj stimulos sciencistojn; mi donos kiel eble plej grandan liberecon al Hispanujo. Morgaŭ mem, mi kaj la reĝino ceestos la unuan prezentadon de la opero **Almilito de Granada**. Ĉu vi estas kontenta. **Farinelli?**

—Entuziasmigata, freneza je kontento; rimarku, via reĝa Moŝto, kiel mi estas dirinta, ke por ĉio nur estas necese voli.

—Jes, vi estis kaj estas prava, kaj tial, mi ankaŭ volas rekompenci la meritojn de la doktoro kaj de liaj kamaradoj...

—Mi petas je via reĝa Moŝto, ke vi ilin pardonu, sufiĉa puno estas ilia malsukceso.

—**Farinelli**, ĉiam vi vin montras grandanima, mi konsentas, ĉar mi multe ŝuldas al vi, eĉ la vivon!

—Kaj mi mian feliĉon—diris la reĝino tre kortuŝite.

Kaj Hispanujo grandan prosperecon tuja kaj sian amatan reĝon—diris la poliestro.

La reĝo, demetante de sia brusto la ruĝan militordenon de **Kalatrava** domis ĝin al la reĝino, kiu diris al **Farinelli**:—Surgenue! **Farinelli** obeis, kaj la reĝino plena je ĉarmo, je ĝojo, alparolis samtempe, kiam



\* ŝi surmetis la ordenon sur bruston de la artisto:—Je la nomo de la reĝo mi faras vin kavaliro de la reĝa kaj milita ordeno de **Kalatrava**, pro via fideleco kaj pro la grandaj servoj faritaj de vi al Hispanujo kaj al ni! Stariĝu, kavaliro!

La ĝojo de **Farinelli** estis grandega; lia triumfo estis absoluta. Li savis la amatan virinon kaj povis vivi apud ŝi, brulante je amo enfermita en sia brusto, el kie neniam li lasis al ĝi sin montri; kaj tiel la reĝino ne estis divenanta lian pasion kaj lin premiis same, kiel oni premias fidelecon de servanto, kaj kvankam ĉi tio estis turmento por li, **Farinelli** estis devigata ne diri «ĉe solan vorton pri sia amo, tial ke nur suspekto de la reĝino pri lia pasio estus sufiĉa por lin malalproksimigi de ŝi. Ju pli bela estis la reĝino, despli virtema!

## VII

Unu solan tangon sufiĉis por ŝangi la staton de Hispanujo. **Carvajal** (Karvaĥal), **Campillo** (Kampiljo), markizo de la **Ensenada** kaj aliaj multaj liberalaj, progresemaj, kleraj kaj spertaj viroj ĉirkaŭis **Ferdinandon VI**.<sup>an</sup> La Inkvizicio estis preskaŭ nuligita kaj neniam plu ĝia fajro brulis. La artoj kaj la sciencoj progresis. Dum lia regado oni fondis la Reĝan Akademion de **San Fernando**, la lernejojn pri navigacio por la mararmeo en **Ferrol** kaj **Cádiz**, la unuajn ŝparkasojn; oni konstruis la reĝan ŝoseon al montaro **Guadarrama** kaj oni starigis efikajn instituciojn.

**Karoli Broschi** konstante rifuzadis esti ministro kaj ĉiajn postenojn; li nur profitis sian influon por la ĝenerala bono de la Ŝtato. Tro modesta, li sin konsideris feliĉa esti intima amiko de la reĝo kaj de la reĝino, kaj neniam li partoprenis la aferojn de la regado. Neniu konis lian malamon. Li malpermesis al siaj italaj parencoj venon al Hispanujo. Lia ĝentileco kaptis simpatian kaj estimon ĉies, kaj lia kanto kaj ludarto tiel ravis ebriligante la aŭskultantojn, ke iam altrangulo, kiu malprave fariĝis lia malamiko, aŭdinte lin kanti, brakpremis lin kaj petegis, ke li forgesu lian riproĉindan konduton. Li direktis la teatron de l' **Buen Retiro**, tiam la plej fama teatro en la tuta mondo. La historio ne priskribas pli grandan influon je la naciestro kaj samtempe pli moderan kaj sindoneman.

La reĝino mortis, kaj testamentis elmontrante sian grandan estimon al **Farinelli**: «Al **Don Carlos Broschi (Farinelli)**, kiel pruvon pri mia

speciala granda estimo al li, mi testamentas fingroringon kun granda diamanto, miajn tri plej bonajn pianojn kaj ĉiujn miajn muzikpapirojn».

En la vivo intima, **Farinelli** saĝe estis helpanta la reĝon en la naciaj laboroj, ĝis la morto de la reĝo, en la jaro 1759.

**Karolo III.<sup>a</sup>** konservis al **Farinelli** liajn salajron kaj rentojn, sed devigis lin forlasi Hispanujon; tial la kantisto starigis sian loĝejon en **Bolonia**, kaj en ĉi tiu urbo konstante li estis protektanta ĉiujn Hispanojn, kiuj alvenis al lia hejmo.

---

---

## HISPANA ESPERANTO-ASOCIO

(H. E. A.)

Se vi estas fervora hispana esperantisto deziranta akceli triumfon de Esperanto en nia lando, vi tuj nepre devos aliĝi; al H. E. A. pagante la jaron kotizon —DU PESETOJN—; al la loka grupo kaj al regiona organizo, sed se viaj monrimedoj permesas al vi iun alian elspezon, atentu bone ke

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(U. E. A.)

(12, Boulevard du Théâtre, Genève, Svisujo) estas gravega internacia organizo, kiu sukcese laboras por ke Esperanto triumfu en ĉiuj rondoj de la nuntempa vivo, kaj ke vi devas aliĝi al ĝi pagante KVIN svisajn frankojn kaj U. E. A. liveros al vi jarlibron kun adresaro de Delegitoj en nombregaj urboj de la tuta mondo, pretaj fari al vi servojn kiajn ajn pri komerco, turismo, k. c. Por Hispanoj la kotizo estas SES pesetojn.

# HISPANA

## ESPERANTO-BIBLIOTEKO

celas eldoni jare dekdu kajerojn, ĉiu el ili 32 paĝa almenaŭ, ĉiam kun la sama formato  $13\frac{1}{2} \times 19\frac{1}{2}$  cm., pri literaturo, historio, legendoj, arto, k. c., de Hispanujo, kvankam iufoje aperigos rimarkindajn fremdajn tekstojn, kun ilustritaj foje, sur luksa papero, por havigi al la Esperantistaro interesajn malkarajn legotaĵojn, kiel atestas tiu ĉi kajero.

Ĝi lotos belegan ORAN MEDAJLON de la VI<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto en Madrido po ĉiu cento da abonantoj, krom DU binditaj kolektoj (1917<sup>a</sup>-1922<sup>a</sup>) de «Hispana Esperantisto».

Ĉiu samideano, sendinte DEK kotizojn el DEK abonantoj varbitaj de li, fakte, estos konsiderata abonanto rajtanta la loton.

El la preparitaj verkoj estas: *du* noveloj de Cervantes, tutmondfama aŭtoro de *Don Kihoto*; tradukitaj poemoj hispane verkitaj de famaj gepoetoj; mirindaj poemoj originale verkitaj esperante de Rafael de San Millán, k. c.; «Postrikolto» kun dudekdu poemoj el diversaj lingvoj, tradukitaj esperante de A. Grabowski, k. c.

Abonu, abonigu kaj propagandu la Bibliotekon; petu specimennon sendante *du respondkuponojn*.

### JARABONO:

Fremduloj: 7 Fr. sv. aŭ egaŭvaloro.

Amerikanoj: 1 dolaro.

Enlandanoj: 7 pesetoj.

TORRENT KAJ COMPI<sup>o</sup>.

VALGAME DIOS, 6

MADRID